10. Jesuo, Via rememor'



2. Aŭdiĝas ne pli milda son',
kantiĝas ne pli gaja ton',
ne plia estas ĝojigil'
ol Vi, Jesuo, Dia Fil'.

3. Al voj-perdint' Vi estas gvid',
sur Vin metiĝas ĉia fid',
al la serĉant' Vi estas cel',
por la trovinto bril-juvel'.

4. Esprimas ne parola fort',
klarigas ne skribita vort' –
spertint' nur venos al la sci',
kiel ĝojigas am' al Vi.

5. Jesuo, nia kor-feliĉ',
spirita lum', fontanta riĉ',
supera Vi anim-dezir',
la plej supera ĉarm-inspir'.

6. Sinjor', do estu nia ĝoj',
premio post surtera voj',
en Vi fundiĝu nia glor',
nun kaj en eterneca hor'.
Amen.

*IESU, DULCIS MEMORIA • Antiphonale Romanum 1912 • M: gregoria • latina T: 12a jc. • malnova brevier-himno por la festo de la plej sankta Nomo de Jesuo • 1a, 2a kaj 5a strofo: brevier-himno por la festo de la Transfiguriĝo de la Sinjoro • E: Guido Holz**